# ?efministro reliefigas la laboron de administrantoj en la ekonomio de Kubo

*Image not found or type unknown*




**Foto: Studio Revolución**

Havano, jan  26 (RHK) La ?efministro de Kubo, Manuel Marrero, ratifis la gravecon de la laboro de la registaraj gvidantoj ?e ?iuj niveloj por elradikigi la distordojn, kiujn la landa ekonomio havas hodia?.

Anta?tage, dum disertacio ?e la supera lernejo por ?tataj kaj Registaraj gvidantoj, Marrero emfazis la respondecon de tiuj, kiuj kondukas la efektivigon de registaraj rimedoj por akceli la ekonomion meze de la nuna krizo.

Ur?as plifortigi la kapablon mobilizi, dialogi kaj esti decida kun alta politika kaj homa sentemo, deklaris la kuba registarestro.

Li la?dis la laboron de tiu supera eduka centro, kiu diplomigis pli ol 15 mil profesiulojn, kies laboro decide influas la kontinuecon de la kuba socia projekto kaj la bonfarton de ?ia popolo, agnoskis la ?efministro.

Li  fermis la akademian programon de la tria eldono de la diplomo pri publika kaj komerca administrado, kie li proponis la konferencon: transformo en registara administrado kaj plifortigo de publika administrado.

La supera lernejo por ?tataj kaj registaraj gvidantoj sur la kariba insulo havas la mision provizi scion al mana?eroj por plibonigi ilian agadon en siaj pozicioj kaj perfektigi administrajn metodojn, stilojn kaj teknikojn.

Fonto: PL

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/345489-cefministro-reliefigas-la-laboron-de-administrantoj-en-la-ekonomio-de-kubo

Radio Habana Cuba